

N-ro 3/2009
21a jaro (2a periodo)



En tiu ĉi numero

de *Inter Ni Dirite*, vi povas legi pri kio okazis en Norvega Junularo Esperantista, kaj mikronovelon tradukitan el la hispana de meksika esperantisto juna, Manuel García Jurado Taracena..

Ĝis, Ejnro

inter ni dirite

- LA JUNULARA FORUMO

Redaktis: Einar Faanes – Enpaĝigis: jpa

Kolapso

*Mikronovelo, «Colapso», de Edgar Omar Avilés.
Tradukis Manuel García Jurado Taracena (2009)*

La astronomiisto, ripozante sur parkobenko, rigardas la kirlajon nenormalan, kalejdoskopon, disartikitan, kiu ellarviĝantas meze de la horizonto: «Ekkomencis la unua fazo de la kolapso: kompaktiĝas la universo; la tempoj reokazos sed ĉi-foje malsanaj, kiel disko ripetiĝonta, kiu turno-post-turne fariĝos pli mallonga... Nu, neniŭ kredis al mi!», li sin diras plorete kaj ridigante.

«Ekkolapso: kompaktas universo; tempoj malsanaj, disko pli mallonga... Neniŭ kredis!», plorante kaj ridante;

«Ek: universo, mallonga...», plorete kaj ridete.

Velkommen til NJE's landsmøte 13. juni 2009

I anledning landsmøtet til vår moderorganisasjon, NEL, vil også NJE holde landsmøte. Det vil finne sted 13. juni kl. 16.30 på Kløvertun, i Os utenfor Bergen.

Vi håper at så mange som mulig finner veien dit!

Vil sende ut mer informasjon til medlemmene per post, men inntil videre finnes informasjon om sted, overnatting og påmelding her: <http://www.esperanto.no/nel/1k/1k2009/>

Jarraporto de NJE 2008

LA JENA ESTRARO sidis dum 2008 (elektiĝis dum landa kongreso de NJE la 12an de junio 2007):

- Judith Parelle Abrahamsen, prezidanto
 - Matias Jentoft, vicprezidanto
 - Einar Faanes, sekretario
 - Leif Arne Storset, kasisto
 - Kenneth Sortland Myklebust, estrarano
 - Oda Aase Johnsen, anstataŭanto
- Oda Aase Johnsen permesite forestis dum la tuta jaro.

Kiel revizoron kaj vic-revizoron la ĝenerala kunveno elektis respektive Arne Olav Mjøen kaj Kristina Nygård.

Okazis 4 interkonsiliĝoj en 2008 – ĉiuj telefone. La ĉefa parto de la estrara laboro okazis retroŝte.

La 31an de decembro 2008 NJE havis 31 membrojn (2007: 28).

KOMITATANO A DE TEJO

Leif Arne Storset estis komitatano A dum la jaro.

FINANCOJ

La organizo havis dum la jaro stabilan ekonomion. La jarkalkulo montris profiton je 770,73 kronoj. NJE posedas NOK 26 973,04 en norvega bankokonto kaj EUR 70,00 en UEA-konto njea-u.

Venonta IND

La venonta *Inter ni dirite* havas limdaton la 28an de aŭgusto. Sendu vian kontribuajon al: nje@esperanto.no

ARANĜOJ POR LA MEMBRARO

Inter la 4a kaj la 6a de aprilo NJE aranĝis Kabanen Semajnfino en arbaro apud Moss en suda Norvegujo. Partoprenis ses norvegoj, du eksterlandanoj kaj hundo. Okazis kuirado, interparolado, ludado kaj promenado en la arbaro. Por kunvenigi membrojn kaj ilin kunaktivigi la aranĝo estis tre utila.

Finance NJE subtenis Studentan Esperanto-Societon pri pico por komuna informkunveno en Oslo pri eo-kurso.

NJE ĉeestis la NEL-seminarion en Trondhejmo la 13an de decembro 2008.

INTER NI DIRITE

Ankaŭ en 2008 *Inter Ni Dirite*, la membrogazeto de NJE, aperis inter la paĝoj de *Norvega Esperantisto*, la membrogazeto de NEL. Ĝi dum la jaro dissendiĝis sesfoje. La estraranoj redaktis ĝin laŭvice kaj ricevis kontribuojn de aliaj membroj kaj estraranoj. Legeblis artikoloj pri diversaj temoj, kaj esperantomovadaj kaj nemovadaj, kaj en Esperanto kaj en la norvega. Ĉiuj numeroj de *Inter ni dirite*, ekde la jaro 2004, ankaŭ publikiĝis en la retpaĝoj de NJE.

RETPAĜOJ

La retejon de la organizo prizorgis Judith Parelle Abrahamsen.

NJE-LISTO

NJE havas retroŝtliston kiu estas malferma al ĉiuj membroj (kaj al aliaj, se la estraro aprobas ilin). Bedaŭrinde, ĝi estas malmulte uzata kiel forumo kaj diskutejo por la mem-

braro. Ĝi ĉefe utilas kiel informosistemo por aranĝoj en Norvegio kaj proksimaj landoj. La komunikado kiu rilatas al la ĉiutagaj farajoj de la organizo diskutiĝas en la retroŝtlisto de la estraro.

BONVEN-PAKAĴO

Dum 2008 NJE sendis bonvenigan pakajon konsistantan el bonveniga letero, prov-ekzempleroj de internaciaj revuoj, ŝlosiloj kaj diversaj faldfolioj. La pakajojn kelkfoje ni sendis iom da tempo post kiam la estraro sciigis pri la nova membro. En la lasta duono de la jaro la sistemo parte malfunkciigis pro tio ke translokigis la prizorganto.

ABON-SUBVENCIO

Ĉiuj membroj rajtas ricevi 50-procentan subvencion por unu esperanto-revuo dum du jaroj. NJE prizorgas la mendon. Unu membro utiligis la oferton.

JEN NIA MONDO

NJE planas eldoni norvegan version de *Jen Nia Mondo*, kurso pri esperanto konsistanta el

du libroj kaj KD (ni tradukos provizore nur la librojn). La laboro iomete stagnis pro manko da laborforto.

PARTOPRENO EN EKSTERLANDAJ ARANĜOJ

Heming Welde Thorbjørnsen kaj Raymond Johansen partoprenis Internacian Junularan Kongreson en Szombately, Hungario.

Leif Arne Storset partoprenis Internacian Seminarion en Germanio la 27an de decembro 2008 ĝis la 3a de januaro 2009.

NJE EN LA AMASKOMUNIKILOJ

Artikolo «Det globale språkproblem» de Vidar Skretting aperis en *Hedmarken* 1/2008.

KONKLUDO

2008 estis bona jaro, kun aktiveco kaj en la membraro kaj en lokaj kluboj. La kabana semajnfino estis bona membroevento por NJE kaj eksterlandanoj. La lasta duono de la jaro estis pli trankvila, sed ni havis bonan kunlaboron kun studenta klubo en Oslo.

PONDUS

n-ro 16

